



Svisa Esperanto-Societo

informas

jaro 2005, numero 5-a: novembro-decembro
kun informoj pri renkontoj ekde la 15-a de novembro



Foto Stefano Keller

Bruno Graf, Nicole Margot, Alain Favre kaj Manfred Westmayer aplaŭde dankataj
konklude al la laŭzana regiona tago de SES de la 15-a de oktobro.

Rememorigilo

SES informas

Redakcio:

Claude Gacond, Poŝtfako 3034,
CDELI, Biblioteko de la Urbo,
2303 La Chaux-de-Fonds.

Retpoŝto: claud.gacond@ne.ch

Tel.: ĉe CDELI: 032 967 68 55,
hejme: 032 926 52 32

Fakso: ĉe CDELI: 032 967 68 29:
indiki: por Claude Gacond

Redaktaj kunlaborantoj:
Rolf Ernst, Nancy Fontannaz, Andy
Künzli, Richard Schneller.

SES informas Redaktaj datlimoj

2006-1: januaro-februaro : decembre 15.
Mencio de informoj ekde la 15-a de januaro.

2006-2: marto-majo : februarie 15.
Mencio de informoj ekde la 15-a de marto.

2006-3: junio-aŭgusto : majo 15. Mencio
de informoj ekde la 15-a de junio.

2006-4: septembro-oktobro : aŭguste
15. Mencio de informoj ekde la 15-a de septembro.

2006-5: novembro-decembro: oktobre
15. Mencio de informoj ekde la 15-a de novembro.

SES-estraro

Bruno Graf, prezidanto, Jurastrasse 23,
3063 Ittigen/Bern. Tel.: 031 921 44 59.
Retpoŝto: bgraf.o@bluewin.ch

Dietrich Weidmann, vicprezidanto,
PF 301, 8034 Zürich. Tel.: 044 251 50 25.
Retpoŝto: info@esperanto.ch

Mireille Grosjean, vic-prezidanto, Grand-
Rue 9, 2416 Les Brenets. Tel.: 032 932 18
88. Retpoŝto: mireille.grosjean@rpn.ch

Nicole Margot, sekretario, Chemin des Lys
4, 1010 Lausanne. Tel.: 021 653 14 67.
Retpoŝto: n.margot@bluewin.ch

Hans-Werner Grossmann, kasisto,
Esperanto-Servo, PF 262, 4132 Muttenz 1.
Tel.: 076 460 8992. Retpoŝto: esperanto-servo@bluewin.ch

Poŝta ĉekokonto

17-581908-4

Svisa Esperanto-Societo 2300 La Chaux-de-Fonds

Kotizoj al SES

kun ricevado de *SES informas*.

fr. 10	Infanoj	ĝis 18 jaroj
fr. 20	Junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
fr. 35	Plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
fr. 50	Paroj	"
fr. 70	Patronoj	"
fr. 25	nura abono al	<i>SES informas</i>



Svisa kalendaro

Novembre

- 19: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.
- 23: Chaux-de-Fonds: Neŭŝatela grup-vespero.
- 24: Basel: ESB: Programo 2006.

Decembre

- 3: Chaux-de-Fonds: CDELI: Kultura seminario.
- 6: Genève: Monata kunveno.
- 7: Luzern: LES: Zamenhof kaj programo 2006.
- 10: Basel: ESB: Zamenhofa festo, ESB 100-jara.
- 11 : Lausanne : Zamenhofa Festo.
- 14: Chaux-de-Fonds: Neŭŝatela zamenhofa festo.
- 15: Redakta datlimo de SES informas.

2006 Januare

- 4 : Luzern: Konversacia rondo.
- 11: Chaux-de-Fonds: Neŭŝatela grup-vespero.
- 21: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.
- 25: Chaux-de-Fonds: Neŭŝatela grup-vespero.

Februare

- 4: Chaux-de-Fonds: CDELI: Kultura seminario.
- 6 : Lausanne: Ĝenerala Asembleo.
- 8: Chaux-de-Fonds: Neŭŝatela grup-vespero.
- 15: Redakta datlimo de SES informas.
- 18: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.
- 22: Chaux-de-Fonds: Neŭŝatela grup-vespero.

Marte

- 4: Chaux-de-Fonds: CDELI: Kultura seminario.

- 8: Chaux-de-Fonds: Neŭŝatela grup-vespero.
- 18: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.
- 22: Chaux-de-Fonds: Neŭŝatela grup-vespero.

Aprile

- 1: Chaux-de-Fonds: CDELI: Kultura seminario.

Maje

- 6: Chaux-de-Fonds: Ĝenerala Kunveno de SES & 50-jara jubileo de CDELI.
- 6-7 : Tête-de-Ran : Jonkvila semajnfino.
- 10: Chaux-de-Fonds: Neŭŝatela grup-vespero.
- 15: Redakta datlimo de SES informas.
- 20: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.

Junie

- 14: Chaux-de-Fonds: Neŭŝatela grup-vespero.
- 17: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.

Julie

- 29 ĝis 6-a de aŭgusto: Florenco : Universala Kongreso.

Aŭguste

- 15: Redakta datlimo de SES informas.

-oOo-

Vivo de SES

Ĝenerala Kunveno de SES kaj 50-jara jubileo de CDELI La Chaux-de-Fonds, Biblioteko de la Urbo Sabaton 6-an de majo 2006

Jam nun ĉiu rezervu la daton de la sabato 6-a de majo 2006, dum kiu digne festiĝos la 50-jara jubileo de CDELI kaj la apero de la Enciklopedio *Universalaj lingvoj en Svislando*, kiun nun finverkas Andreas Künzli kaj kies kuneldonantoj estos Svisa Esperanto-Societo kaj CDELI, fako de la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds.

La detala programo de tiu renkonto aperos en la venonta januara-februara bulteno de *SES informas* 2006-1. Jam nun ni povas anonci, ke la SES-kunveno okazos matene en aŭlo sametaĝa al la CDELI-salono, kiun afable disponigis la direkcio de la lernejo Numa-Droz, ke la komuna tagmanĝo disvolviĝos en la najbara restoracio de la turo Espacité, el kies panorama ĉirkaŭbalkono admireblas la urbo, kaj ke posttagmeze festiĝos la CDELI-jubileo kun prezento de ekspozicieto en ĵus renovigita kaj pligrandigita biblioteko.

Kultura Semajnfino de SES kaj CDELI La Sagne, Hotelo Von Bergen Sabaton 6-an kaj dimanĉon 7-an de majo 2006

Konklude al la kunveno en la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds tuj poste malfermiĝos Kultura Semajnfino en la najbara vilaĝo La Sagne atingebla per bela montara trajneto. Profitu longigi vian restadon en la neŭŝatela montaro per partopreno ankaŭ al tiu renkonto en vilaĝo ludinta gravan rolon koncerne al la eksperimenta instruado de esperanto en publika lernejo.

Sed ĉar la nombro de hotelaj litoj je dispono estas limigita, jam nun anoncu vian intencon partopreni tiun ĉi aranĝon al Claude Gacond, CDELI, CP 3034. 2303 La Chaux-de-Fonds, claude.gacond@ne.ch.

-oOo-

Donacoj

Donacoj en frankoj:

Al SES: Ahmed Ameziane, La Chaux-de-Fonds: 50; Verena Elsner-Bürki, Zürich: 50; Marianne Hubert, Lausanne: 25; Parzival, Biel/Bienne: 5; Myriam Schwitter, Carouge: 20; Marguerite Viredaz, Lausanne: 20. Sume: 170.

Donacoj sekve al la SOS-helpopeto de la SES-prezidanto Bruno Graf pri la vizito de Aŭstralia klaso (kanguruoj) al la esperanto-lernantoj de La Grande Ourse (ursoj): Claude & Andrée Gacond, La Chaux-

de-Fonds : 150 ; Bruno Graf, Ittigen : 100 ; Gabriel & Verena Chaves-Walder, Flawil : 100 ; Jean-Jacques Lavanchy, La Tour-de-Peilz : 100. Sume: 450. Tiu ĉi sumo estas transpagita al La Grande Ourse.

Nome de SES la kasisto Hans-Werner Grossmann dankas la registritajn donacintojn pro ties malavareco.

-oOo-

Tutsvisa aktiveco

CDELI

Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia

Biblioteko de la Urbo

Progrès 33, CP 3034, 2303 La Chaux-de-Fonds. Tel. : 032 967 68 55.

Fakso : 032 967 68 29, indiki : por CDELI.

Retadresoj : cdeli.vch@ne.ch

martine.schneller@ne.ch

claude.gacond@ne.ch

nancy.fontannaz@ne.ch

monika.molnar@ne.ch

Atentu pri la venontaj stud-aranĝoj !

Didaktikaj stud-sabatoj

2006 januare 21, februare 18, marte 18, majo 20, junio 17. Ili okazas la 3-an sabaton de la monato helpe al ĉiuj esperantolernantoj: tutkomencantoj, komencantoj kaj progresantoj.

La sabata seminario

La celo de tiu seminario, kiu disvolviĝas sub la aŭspicio de SES,

ILEI kaj UEA, ne estas la studo de la lingvo mem, sed kleriĝo koncerne al la historio kaj al la literaturo de esperanto. Jen la venontaj datoj de tiu seminario okazanta principe la unuan sabaton de la monato en neferia periodo : **decembre 3, 2006 februare 4, marte 4, aprile 1.**

Ambaŭ aranĝoj disvolviĝas ĉe CDELI en la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds laŭ la sama horaro :

Horaro

9 h 30: Malfermo de la CDELI-salono kun eblo aĉeti librojn kaj babili kafumante.

10 h 30: **Oficiala malfermo**, formiĝo de la stud-rondoj.

11 h 00: **1-a studperiodo.**

11 h 45: paŭzo.

12 h 00: **2-a studperiodo.**

12 h 45: Paŭzo por komuna tagmanĝo en najbara restoracio.

14 h 30: **3-a stud-periodo.**

15 h 15: teuma paŭzo.

15 h 30: **4-a stud-periodo.**

16 h 15: **Konkluda kunveno.**

16 h 30: Teumo, librovendo.

17 h 00: **Oficiala fermo.**

17 h 30: Fermo de la CDELI-salono.

Aliĝo: Por faciligi la organizon de la studaj kaj seminariaj sabatoj ĉiu bonvolu nepre antaŭanonci sian partoprenon al Claude Gacond almenaŭ ĝis la antaŭa vendredo :

ĉu skribe : Claude Gacond, CDELI, Biblioteko de la Urbo, CP 3024, 2303 La Chaux-de-Fonds,

ĉu rete: claudEGAcond@ne.ch

ĉu telefone: CDELI: 032 967 68 55, (hejme 032 926 52 32).

Partoprenkotizo: Por minimuma kovro de la elspezoj la partoprenkotizo estas po Fr. 15.- por partopreno en la stud-sabato (lernejano, studento, metilernanto senpage), kaj po Fr. 20.- por partopreno en la sabata seminario. Kiu ne antaŭanoncis sian partoprenon, tiu pagas pluse Fr 5.-.

Raporto

Legu la raporton pri la tre sukcesa sabata seminario de la 5-a de novembro kun André Cherpillod en la rubriko

Kongresen

je paĝoj 16-18.

-oOo-

KCE

Kultura Centro Esperantista

Strato Postiers 27, Poŝtfako 311

2301 La Chaux-de-Fonds

Tel. & Fakso : 032 926 74 07


kce.esperanto@bluewin.ch

Raportoj kaj programo

aperas en la ĵurnalo

Heroldo de Esperanto

-oOo-



Loka vivo

Averto : Por la januara-februara numero 2006-1 de *SES informas*, kiu dissendiĝos dum la unua duono de januaro la redakta datlimo estas je la 15-a de decembro. Informantoj pri la loka vivo bonvolu tuj havigi siajn raportojn ĝis tiu dato al Claude Gacond, Poŝtfako 3034, CDELI, Biblioteko de la Urbo, 2303 La Chaux-de-Fonds. Retpoŝto : claude.gacond@ne.ch .

Basel

Esperanto-Societo Basel

PF 103, 4005 Basel, Tel.: 0049 76 214 57 12
Kunvenoj : 20 h 00 en la kelo de la malantaŭa domo, Riehenring 129.

Kunvenoj

Novembre 24: Programo 2005.

Decembro 10:

Ĉiuj venu kunfesti!
**Zamenhofa festo kaj
100 jariĝo de
Esperanto-Societo Basel**
En la Kunvenejo de la evangelia-
metodista eklezio, Riehenring 129.

Atingebloj:

Ekde la SBB-stacidomo per la buso 30 al la haltejo Riehenring.
Ekde la badema stacidomo per la buso 30 al la haltejo Boletto.
Per aŭto: autoŝoseo eliro Mustermesse ĉe la kruciĝo maldestre ĝis Mustermesse, poste sekvi Riehenring. Parklokoj disponeblas en la korto.

Programo

11h00: Alveno kaj aperitivo.
12h00: Tagmanĝo: Salato, alpaj nudeloj (Älplermakronen).
13h00: Foriro al Barfüsserplatz.
13h45: Elekte inter tri vizitoj: Kristnaska foiro, Historia muzeo, Pupmuzeo.
15h30: Reveno al la salono Riehenring.
16h00: Kafumo.
17h00: Muziko kaj kantado kun Paul Scherer.
17h30: Prelego kun lumbildoj pri la historio de ESB far Andy Künzli.
18h15: Muziko de Paul Scherer.
18h30: Vespermanĝo: Porka rostaĵo (Schweinebraten), Terpoma kaĉo, verdaj fazeoloj, deserto.
20h00: Koncerto kun pianisto kaj kantistino. Gratulkanto al ESB komponita de Kurt Schweizer.
21h00: Fino de la oficiala parto.
Pli longa restado eblas.

Sendu vian aliĝon al Esperanto-Societo Basel, PF 178, 4005 Basel ĝis la 1-a de decembro, ne forges-

ante menciĵojn viajn familian kaj inividuan nomojn, telefonnumeron kaj plenan adreson. Kaj samtempe ĝiru la sumon de F 40.- al la poŝta konto 40-33714-4 Esperanto-Societo Basel.

Nicole Bérourd-Focke.

-oOo-

Genève

Esperanto-Grupo „La Stelo“

Case postale 188, 1211 GENÈVE 20

Espéranto-infos : Tel. : 022 740 04 45

Monata kunveno ĉiun unuan mardon de la monato (krom julie kaj aŭguste) en la stacidomo de Cornavin, kajo 1, Salle des conférences 2, je la 20 h 00.

Kunvenoj

Decembre 6 : Ni festos la premiiton de nia jubilea konkurso.

2006 januare 3 : Temo decidota.

Raporto

La kunveno de oktobro temis pri kongresoj. Ĉeestis 14 personoj, inter kiuj gesinjoroj Mireille kaj Yvon Grosjean el Les Brenets. Ĉiuj raportis pri siaj travivaĵoj.

Hector Hodler kaj la paco

La unuan de novembro mi havis la honoron prelegi pri la temo *Hector Hodler kaj la paco* antaŭ pli ol 20 stelanoj vigle partoprenemaj. Per retroprojekto de pentraĵoj de Ferdinand Hodler mi vidigis, en kiu neordinara medio vivis Hector, filo de la pentristo kun lia modelo, la bela Augustine Dupin, kiel li ŝatis nomi ŝin. Ekde la beba aĝo Hector fakte

pergajnis sian vivon pozante ĉiutage plej ofte nude en la ateliero de sia patro, ĝis kiam, okaze de la dua Universala Kongreso de Esperanto en 1906, kiun li kunorganizis en Ĝenevo, lin dungis kiel sekretarion René de Saussure, la frato de la lingvisto Ferdinand. Ekde tiam por Hector kaj la esperantistaro komenciĝis nova periodo kun la fondo de UEA kaj pere de la organo *Esperanto* aperado unue de artikolaro dediĉita al prilingvaj kaj primovadaj temoj, kiuj ĉesigis la nurajn prilingvajn diskutojn favore al peresperantaj aktivecoj. Ekde februaro 1915 per sia alvoko *Super Hector Hodler* komencis artikolaron nur dediĉitan al la temo *Milito kaj Paco*, kiu kontribuis al la kreo de Ligo de Nacioj en Ĝenevo mem fare de la usona prezidanto Wilson. Franclingve Hector Hodler verkis sub la pseŭdonomo « Homo ». La vesperon agrable konkludis aktiva partopreno de ĉiuj stelanoj per vica laŭtleĝo de la alvoko *Super*, kiu restos bedaŭrinde aktuala, tiom longe kiam nia mondo eterne militemos kaj restos naciisme pensanta. Dankon al la stelanoj pro la kvalito de la laŭtleĝo de la hodlera alvoko kaj pro la dinamismo de la grupo La Stelo, kies anoj ne hezitas regule veturi al CDELI en La Chaux-de-Fonds por partopreni la sabatajn didaktikajn studojn kaj la seminarion.

Claude Gacond.

-oOo-

Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo

Case postale 246, 1000 Lausanne 22

Tel: 021 657 14 56

<esperanto@isuisse.com>

<<http://www.esperanto.ch/Lausanne>>

Kunvenoj : Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun unuan

lundon de la monato je la 20 h 00.

Kunvenoj

Decembre 11 : Zamenhofa Festo.

2006 januare 9: Temo anoncota.

Februare 6: Ĝenerala Asembleo.

-oOo-

Luzern

Lucerna Esperanto-Societo

Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke

Tel.: 041 280 46 12.

Kunvenejo:

Hotelo Waldstätterhof, Zentralstrasse 4
(proksime de la stacidomo). Tel. 041 2 271 271.

Gesinjoroj Anna & Koni Rey, Heimatweg 4,
6003 Luzern. Tel.: 041 210 25 88.

Kunvenoj

Decembre 7: Ĉe ges-roj Rey: 14h30:

Zamenhofologio kaj programo 2006

kun Paul Scherer.

-oOo-

Kantono de Neuchâtel

Neŭŝatela grup-vespero

Ĉar la CDELI-salono en la biblioteko ne estis alirebla vespere pro la transformoj, la kunveno de la 9-a de novembro devis translokiĝi al la restoracio de la Turo Espacité. La samon ni devos fari por la sekva kunveno. Espereble en decembro la CDELI-salono ree alireblos vespere.

Jen la datoj de la venontaj neŭŝatelaj grup-vesperoj, kiuj principe disvolviĝas en la CDELI-salono la duan kaj kvaran merkredojn de la monato de la 19h45 ĝis la 21h45 aŭ aliloke sekve al propono de invitantoj.

Novembre 23, en la restoracio turo Espacité, kie Claude Gacond atendas vin ekde la 19h45.

Decembre 14: Zamenhofa Festeto espereble en la CDELI-salono.

2006 januare 11 kaj 25.

Februare 8 kaj 22.

Marte 8 kaj 22.

Maje 10.

Junie 14: fondua vespero.

Estas petita partoprenkosto de po Fr. 4.- por vespero por la kovrado de la elpezoj. Vigligos tiujn vesperajn renkontojn Monika Molnar, Claude Gacond kaj eble aliaj gvidantoj.

-oOo-

Wil

Esperanto-Klubo Wil

Prezidanto: Stanislaw POCHANKE
Lettenstrasse 70, 9500 Wil. Tel.: 071 911 68 30.
Vicprezidanto: Verena CHAVES-WALDER.
Rosenhügelstrasse 22, 9230 Flawil.
Tel.: 071 393 41 49.
Kunvenoj: la unuan merkredon de la monato je
la 19 h 00 en la Restoracio Blumeneck, Säntis-
strasse 1 (malantaŭ la stacidomo).

-oOo-

Zürich

Esperanto-Societo Zürich

Akazienstr. 6 / PF 858, 8034 Zürich-Seeefeld
Tel.: 044 251 50 25 <info@esperanto.ch>
reto: www.esperanto.ch/zuriko

Programo Aŭtuno-Vintro

100-jara solenaĵo de Esperanto Societo Zuriko Mardon 20-an de decembro 19h00 ĝis 23h00

Loko: Esperantejo, Akazienstrasse 6,
8008 Zürich-Seeefeld

Programo:

19.00 Malfermo de la pordoj,
aperitivo kaj librejo malfermita.
19.30 Fonduado.
20.30 Bunta vespero, kun festa
parolado, muziko, kulturaj prezentaĵoj
kaj skeĉoj.

101-a Ĝenerala Kunveno de Esperanto-Societo Zuriko Vendredon 10-an de februaro 2006 19h00 ĝis 22h00

Programo:

19.00 Spagedumado
20.00 Ĝenerala Kunveno kun la
statuta tagordo.
21.00 Kulturaj prezentaĵoj.

Regule

(krom dum la lerneĵaj ferioj)

Merkredvespere:

18.00–18.45 : kurso por komencantoj.

19.00–19.45 : konversacia rondo.

(por la merkredaj kursoj bonvolu aliĝi ĝis la tago
antaŭa sub telefono 044 251 50 25 dum la
oficejhoraro aŭ retpoŝte sub info@esperanto.ch).

Raporto

Eta informado pri la klubo vivo de Esperanto-Societo Zuriko:

La 15-an de septembro okazis en
Esperantejo publika prelego, kiu estis
anoncita en la revuo „PH-Akzente“
de la Pedagogia Altlernejo. Prelegis
Dietrich Weidmann pri la pro-
pedeŭtika valoro de esperanto kaj pri
lingvo-politiko. La partoprenantaro
per multaj demandoj vigle partoprenis
la debaton kaj rezulte de la vespero la
postan merkredon ni povis komenci
novan kurson por komencantoj.

Samvespere ankaŭ startis la
konversacia rondo sub gvido de Dieter
Rooke. Kaj la konversaciaj vesperoj
fariĝis regule tiel viglaj, ke ili daŭr-
adis, anstataŭ kiel anoncite ĝis la 20-a
horo, regule ĝis preskaŭ noktomezo,
tial fine ni fojfoje devis preskaŭ eljeti


la homojn, por eviti, ke ili eĉ tranoktu en la ejo !

Bone evoluas ankaŭ la disvendado de lernolibroj, vortaroj kaj literaturo en la Esperanto-librejo Zuriko – nia librejo momente havas surloke stokon kun iom pli ol 250 titoloj kaj per la profito el la librovendado ni konstante pligrandigas la elekton.

Daŭre ni ricevas multajn inform-petojn tra le reto. La fenomeno, ke la homoj mem studas la lingvon per la perretaj kursoj, ankoraŭ plifortiĝis.

Dietrich M. Weidmann

-oOo-



Kongresen

Eĥoj el la laŭzana renkonto

15-an de oktobro 2005 en Picejo Le Milan

Tre agrabla etoso

Kun la prelegantoj Bruno Graf el Ittigen/Bern, Manfred Westmayer el Gundelfingen en Germanio kaj Alain Favre el Chens-sur-Léman en Francio, entute la renkonto grupigis 30 personojn ege aŭstultemajn dum la prelegoj, aktivajn dum la diskut-momentoj kaj entuziasme babilemajn dum la komuna manĝo.

La prelegantoj akceptis mem verki resumon de sia kontribuo por aperigo en nia bulteno. Tiel nepartoprenantoj akiros ideon pri iliaj diroj kaj la partoprenintoj povos remediti la aŭditaĵojn. Jen ĉinumere kun nia dankemo jam aperas kontribuaĵoj de Bruno Graf kaj

de Manfred Westmayer. Aliaj sekvos en la venonta bulteno.

Tiuj regionaj tagoj tutcerte plenumas gravan rolon koncerne al la vivo de nia societo, kies membroj povas tiel reale konatiĝi. La novbakitaj esperantistoj havas la okazon ekpraktiki la lingvon, veteranoj rememorigi al si reciproke pasintaĵojn kaj ilin rakonti al la novuloj. Tio certe garantias harmonian evoluon de la societo. Kaj malkovriĝas novaj talentoj certe utilaj al la estonteco mem de nia movado. Do ĝis al la sekva regiona tago de SES kun vigla danko al Nicole Margot pro la modela organizo de tiu laŭzana renkonto, kiun ŝi inaŭguris muntante skrib-

tabulon ĵus aĉetitan. Kaj la listo de la partoprenantoj ebligas al ĉiuj daŭrigi interŝanĝojn letere aŭ rete.

Claude Gacond.

Kiel prezenti esperanton dum la angla regas?

Bruno Graf

Tiu demando estas la plej grava por informantoj aŭ varbantoj. Ĝi okupas min depost jaroj. Vi konsentas, ke estas ege malfacile disvastigi esperanton. Denaskuloj estas tro malmultaj. Do ni devas daŭre trovi interesatojn kaj lernantojn, alimaniere la esperanta komunumo formortas. Ni staras antaŭ granda defio.

Kvankam ni estas konvinkitaj esperantistoj, ni procedas kaj argumentas ofte malsperte. Ni estas kaptitaj en Esperantio kaj ne plu vidas la mondon per la okuloj de neesperantistoj. Esperanto estas por ni memkompreneblaĵo, por neesperantistoj estas utopio.

El la merkatico ni scias, ke ni devas sentigi problemon, bezonon aŭ deziron, se ni volas vendi produkton. Kaj jen kuŝas la dilemo por ni. La homoj ne perceptas lingvan problemon. Ili konjektas, ke la angla estas mondlingvo. Cetere en Svislando ekzistas kvar oficialaj lingvoj, parolataj estas multe pli. Ni al kutimiĝis lerni fremdlingvojn kaj taksas tion tute normala.

Kial lerni esperanton vidalvide de la angla, estas centra demando. Mi rekomendas al informantoj paroli pri la tutmondiĝo. Ĉiuj homoj komprenas

tiun esprimon kaj havas spertojn. La internacia kunlaboro densiĝas ekonomie kaj politike, sed samtempe kreskas internaciaj problemoj, ankaŭ sentiĝas lingvaj baroj.

Internaciaj organizaĵoj kaj entreprenoj, lingvistoj kaj intelektuloj scipovas interkompreniĝi internacie, sed la granda plimulto de la homoj balbutas fremdajn lingvojn. La plurlingveco, lanĉita de Eŭropa Unio, havas limojn, ofte restas teorio. Malmultaj regas plurajn lingvojn. Oni povas paroli pri duklasa socio, unu triono regas plimalpli fremdan lingvon, du trionoj ne povas interkompreniĝi kontentige. Ankaŭ traduk-helpiloj kaj plej rafinitaj lerniloj ne sufiĉe helpas. Tio estas vera tutmonda problemo, kiun multaj ignoras. Mi kuraĝas levi la tezon, ke **naciaj lingvoj estas principe malfacilaj kaj ne taŭgas kiel universalan lingvon.**

Kaj la angla, kiu havas simplan gramatikon? Ĉiu, kiu konas la anglan, povas konfirmi, ke tiu lingvo estas kompleksa. La skribmaniero kaj la prononco estas tre malfacilaj. Multegaj vortoj havas diversajn signifojn. Spite la angla estas plej uzata, ĉefe en komerco kaj scienco. La kaŭzo ne estas lingva, sed kuŝas en la enorma ekonomia potenco de Usono.

Kiel konduki vidalvide de la angla? Gian Carlo Fighiera, longjara kongresa sekretario de UEA, donas jenan rekomendon en la diskutkajero *La strategio de Esperanto en la nova jarmilo*: „Ankaŭ la esperantistoj realisme agnoskas la anglan kaj laŭ-

bezone lernas kaj utiligas ĝin, tio des pli ke la angla kaj esperanto manifestas du diversajn realaĵojn. Malgraŭ sia disvastiĝo, la angla restas esence nacia lingvo, dum esperanto estas supernacia. La angla donas laŭkvante pli multan utilon ol kiu ajn alia lingvo, sed esperanto posedas plian dimension, nome ĝi peras la konscion de tutmondaj aparteno kaj integriĝo. Oni lernu iun ajn lingvon, kiu plaĉas aŭ utilas por profesiaj kaj aliaj bezonoj, sed kiu emas sperti la internacian vivon, tiu lernu ankaŭ la facilan kaj belan esperanton, ĉar ĝi malfermas pordojn kaj fenestrojn al mondo superetna kaj ebligas senperajn kontaktojn kun aliaj homoj kaj kulturoj.“

Dua tezo: La solvo de la internacia lingvoproblemo estas planita lingvo. Inter la multaj projektoj nur esperanto evoluis al vivanta lingvo. kiel atestas la interlingvistiko. Esperanto plenumas la kriteriojn de interlingvo: nome neŭtrala, facile lernebla, esprimriĉa. La neŭtraleco estas esenca trajto, sed samtempe la malforta flanko. Neniu nacio aŭ potenco staras malantaŭ esperanto. Nur la esperantistaro disvastigas kaj defendas ĝin, idealisma minoritato sen sufiĉaj rimedoj. Tio parte eksplikas, ke esperanto ne progresis pli rapide. Naciaj interesoj de ekonomie fortaj ŝtatoj malhelpas la enkondukon de tiu lingvo, sed ankaŭ antaŭjuĝoj kaj mitoj.

Depost 30 jaroj la internacia lingva situacio ŝanĝiĝis. La totala hegemonio de la angla minacas la

lingvan ekvilibron. Tial UEA adaptis la strategion kaj lanĉis la postulon de „lingva demokratio“, nome pli justan lingvan ordon. Unusola nacia lingvo monopolas en la tuta mondo, penetras la lingvojn kaj kulturojn, eĉ voras ilin. Usono per kaŝita premado akcelas tiun evoluon, ĉar la profito kaj la influo estas enormaj. Tamen interese estas, ke la homoj malofte kontraŭas la usoniĝon kaj emas lerni la anglan pro ekonomiaj kaj profesiaj kaŭzoj, sed kelkaj ŝtatoj kiel Francio, Rusio kaj Ĉinio kontraŭstaras.

Tiu nova argumentado taŭgas precipe en politikaj kaj juraj debatoj, en kontaktoj kun UN, UNESKO, Eŭropa Unio, ktp. Oni scias, ke en tiuj organizaĵoj la angla ĉefrolas malfavore al aliaj oficialaj lingvoj. Tiu fenomeno nomiĝas lingva diskriminacio, termino bone konata. Tuta alianco batalas kontraŭ ĝi, ankaŭ ni, ĉar ni kredas, ke esperanto kontribuas al lingva egaleco.

Plia argumento, kiun homoj komprenas, estas la ekonomia flanko de la internacia komunikado, kiu estas ege multekosta. Oni povus ŝpari gigantajn sumojn en la lernado kaj uzado de fremdaj lingvoj. Konvenas atentigi pri intervjuo de François Grin, profesoro en la universitato de Ĝenevo, aperinta en „*Le Temps*“ la 22-an de junio 2005. Li konsilas la francan registaron pri lingvopolitiko, nome pri la kostoj de la instruado de fremdaj lingvoj. Li prikalkulis tri modelojn: la anglan kiel mondlingvon, la plurlingvismon en Eŭropo kaj esperanton kiel interlingvo.

Li diris france: *"D'un point de vue purement rationnel, l'espéranto offre la solution idéale: la moins chère, notamment parce qu'on dépenserait moins pour apprendre une langue infiniment plus facile que l'anglais. Avec l'espéranto, l'Europe économiserait 25 milliards par an. C'est aussi la solution la plus équitable, puisque tout le monde serait sur pied d'égalité. Et c'est une voie qui n'écrase pas les cultures européennes. D'un autre côté, la voie de l'espéranto semble aujourd'hui bien improbable, car elle suscite d'étonnantes réactions de rejet. Pour qu'elle soit réalisable, il faudrait que tous les pays européens s'accordent pour se lancer dans un projet à long terme..."*

Ankaŭ la germana profesoro Selten, nobelpremiito, faris studojn pri la kostoj de la eŭropa ne-komunikado. Ili aperis en *Esperanto*. Li kredas, ke la propedeŭtika valoro de esperanto povus tenti la homojn lerni esperanton. Kiam ili konstatos, ke la penoj estas relative malgrandaj kaj ke eblas facile interkompreniĝi, multaj homoj transirus al esperanto.

Nu, por interesuloj gravas antaŭ ĉio la konkretaj avantaĝoj, kiujn donas esperanto. Ni ne plu vivas en la pionira periodo, kiam oni lernis esperanton eŭfore pro idealismo. Materialismo karakterizas la hodiaŭan mondon. Esperanto nun tiom evoluis, ke ĝi peras avantaĝojn. Tio plej multe instigas homojn lerni esperanton.

En diskutkajero de UEA Aleksander Korĵenkov, eldonanto kaj

redaktoro de *La Ondo*, analizis la ŝancojn de esperanto post la jaro 2000. Li skribis: „Niaj informantoj kaj instruantoj evitu blagon kaj demonstreu la valorojn kaj aplikeblojn de esperanto:

- La propedeŭtika valoro en la lingvo-lernado
- La delegita reto kiel informejo
- La konsiderinda disvastiĝo de esperanto en interreto

Laŭ Korĵenkov oni eklernas esperanton plejparte por larĝigi sian horizonton, por akiri konatojn kaj kontaktojn alilande, por variigi sian tempopasigon aŭ pro ĝenerala intereso pri lingvo.

Kaj laste oni ĉiam atentigu pri la plusoj de esperanto kompare al la angla.


- Pli facile kaj rapide lernebla,
- Politike neŭtrala,
- Esperanto ebligas samnivelan komunikadon,
- Peras amikecan internacian kunvivadon.

Mi opinias, ke ekzistas bonaj argumentoj pledi por esperanto, ankaŭ en tempo kiam la angla regas, sed ni devas procedi metode.

Bruno Graf.

Mallongigita teksto de parolado prezentita dum la regiona kunveno en Lausanne 15.10.2005.

-oOo-



La dokumento « Ave v05 » AVE: Esperanto en la Verda Partio

En la prelego ĉefe temis pri verdaj partioj, sed la politika sukceso de Esperanto ankaŭ dependas de samideanoj en aliaj partioj. La Asocio de Verduloj Esperantistaj, AVE, estas Ne-Registara Organizo, kiu ligas la Verdajn Movadon kun tiu de Esperanto. Ĝi estis fondita 1984 en Liège (Belgio) okaze de la unua renkontiĝo de la Eŭropaj Verdaj Partioj. En 2005 ĝi havas pli ol 450 membrojn kaj abonantojn de la bulteno AVENO.

AVE-membroj parolas Esperanton kaj estas verdpartianoj aŭ subtenas ekologiajn, socialajn kaj pacajn temojn. AVE kunlaboras kun UEA kaj SAT. AVE informas unuflanke la verdajn politikistojn pri la avantaĝoj de Esperanto, kaj aliflanke la samideanojn pri Verda Politiko kaj diskutas ĝin; kaj okaze de internaciaj Esperanto-Kongresoj kaj okaze de internaciaj Verdpartiaj Kongresoj.

Al la laboro de AVE apartenas la ĉi-rilata terminologio pere de tradukado de gravaj politikaj dokumentoj. Ekzemple pri "Konflikt-Solvado por Preventi Militojn", "Programaj Gvidlinioj de la Verdaj Partioj (1994, Helsinki)", "Ekologia Impostado (1999)" kaj la "Ĉarto de la Tutmondaj Verduloj (2001, Canberra)", "ĜKKS - Kritiko al la Ĝenerala Konvencio de

Komerco je Servoj". La ret-paĝaro de AVE montras aktualajn problemojn kaj multajn ligojn al verdaj partioj kaj multaj NRO-oj.

Kiam eblas ni partoprenas je Verdpartiaj Kongresoj; kaj ekz-e sukcese prezentis la jenan rezolucion al la Eŭropa Verda Kongreso en Parizo (1999); ĝis nun la politikistoj - krom en Hungario - ne faris ion, sed tio ankaŭ bezonas daŭran kunlaboron de ni.

Jen la rezolucio koncize:

A. Enkonduki Esperanton en la eŭropaj lernejoj kiel elekteblan lingvon.

B. Esperanto iĝu unu el la laborlingvoj en la Eŭropa Unio kaj Parlamento, por reprezenti la ne-oficialajn lingvojn.

La kunlaboro de esperantistoj kun la verdaj partioj komenciĝis en 1984 per 40-lingva afiŝo, inkluzivante esperanton :

"Atomenergio - Ne dankon."

En 1991 okazis – instigite de la hungaraj verduloj kaj perinta de Mireille Grosjean – interpretado de la plenaj sesioj en la unua Eŭropa Verda Kongreso en Zuriko. Les Verts de Francio en sia baloto-programo 1999 proponis esploron de la potencialo de Esperanto ene de la Eŭropa Parlamento. Okaze de la balotokampanjo al la EP en 2004 la finna verda partio produktis afiŝon ankaŭ uzante la sloganojn en Esperanto (dank'al Walter Klag). La plej aktuala projekto uzas Esperanton kiel relaksan lingvon por la memprezento de EU-Parlamentanoj; krom la 20 oficialaj

lingvoj ankaŭ en la albana, bulgara, katalana, kroata, rusa kaj serba - sur la retejo:

<<http://ikso.net/verduloj/MEP/>>

Tre bona afero estas la ret-ligoj de la ekstera mondo al Esperanto -ĉu ne? Tion atingis AVE tradukante la "Tutmondan Ĉarton de la Verdaj Partioj" (2001, Canberra), trovebla sur la ret-paĝoj de AVE; kaj ankaŭ petita traduko de la enkonduka paĝo sur regiona retejo de la "Amikoj de la Tero" en sud-okcidenta Germanio "BUND" dokumentas la vivon de la Internacia Lingvo.

Kompreneble sur la retejo de AVE troviĝas multaj ret-ligoj al verdaj partioj kaj al asocioj, kiuj havas similajn temojn, sendepende de ilia lingvo.

La diskuto montris ke plej bone membroj de la diversaj partioj informu siajn sampartianojn pri Esperanto - almenaŭ unu diris ke li havas ĉi-rilatjn ligojn kun la social-demokrata partio.

Kaj la pola esperantistino Margareta Handzlik eĉ estas membro de la Eŭropa Parlamento.

La temon prezentis
Dr. Manfred Westermayer,
sekretario de AVE.

Kandelstr 62
DE-79194 Gundelfingen.

e-poŝto:

M.Westermayer@comlink.org.

<http://www.comlink.apc.org/ave/>

-oOo-

Tre sukcesa renkonto kun André Cherpillod

pri Hillel la saĝulo, lia vivo, lia instruo kaj la zamenhofa hilelismo
ĉe CDELI en la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds
la sabaton 5-an de novembro


inaŭgure al la organizo de sabata seminario sub la aŭspicio de SES, ILEI kaj UEA.

Trideko da partoprenantoj venintaj ne nur el la neŭŝatela regiono, sed ankaŭ el la ĝeneva, vaŭda, friburga, berna kantonoj kaj el la najbara urbo Besançon, sekvis kun granda atentemo kaj intereso la instruon de André Cherpillod pri temo fakte aktuala, ĉar ekzakte antaŭ 100 jaroj, inter la unua Universala Kongreso en Boulogne-sur-Mer kaj la dua en Genève, L.L.

Zamenhof diskonigis sian etikan penson per la *Deklaracio de Hilelismo*, kiu la saman jaron reeldoniĝis kiel *Deklaracio de Homarano*.

La du matenajn stud-periodojn André Cherpillod dediĉis al la juda saĝulo Hillel, ĝenerale nekonata ekster la hebreaĵ medioj, kiu, veninte el la babilona diasporo, diskonigis sian penson en Jerusalemo apenaŭ pli

frue, ol tion faris Jesuo. André Cherpillod komparis instruajn dirojn de la fariseo Hilelo kun frazoj de Jesuo troveblaj en la Evangelio. Ni menciuj kelkajn el ili:



André Cherpillod preleganta

Hilelo: *Vi ne juĝu vian proksimulon, ĝis vi alvenos al lia loko* (Abot, 2.5). Jesuo: *Kiu el vi estas senpeka, tiu unua ĵetu sur sin ŝtonon* (Johano 8.7). Hilelo: *Multa posedaĵo, multa maltrankvilo* (Abot, 2.8). Jesuo: *Ne provizu al vi trezorojn sur la tero* (Mateo 6.19). Hilel: *Serĉanto de gloro perdas sian gloron* (Abot, 1.13). Jesuo: *Mi ne serĉas mian gloron* (Johano 8.50). *Mia humiliĝo estas mia ekzaltiĝo, kaj mia ekzaltiĝo estas mia humiliĝo* (Levidoj Rabba, 1.5) Jesuo: *Ĉiu, kiu sin altigas, estos humiligita, kaj kiu sin humiligas, tiu estos altigita* (Luko 14.11).

La hilela maksimumo *Kio estas malagrabla al vi, tion ne faru al via proksimulo*, kiu estas nomata la Ora Regulo de Hilelo, kompareblas kun la

jesuaj vortoj *Ĉion ajn do, kion vi deziras, ke la homoj faru al vi, ankaŭ faru al ili, ĉar tio estas la leĝo kaj la profetoj* (Mateo 7.12) *Kaj kiel vi volas, ke la homoj faru al vi, faru ankaŭ al ili same* (Luko 6.31).


André Cherpillod atentigis, ke la sola diferenco estas, ke Hilelo eldiras tion negative kaj Jesuo pozitive. Kaj li aldonis, ke similan instruon oni ankaŭ trovas ĉe Taleso, Herodoto kaj Konfuceo.

Koncerne al sia hilelismo Zamenhof sin klare esprimis en letero al Alfred Michaux, la organizanto de la unua Universala Kongreso: *Tiu ĉi plano (kiun mi nomas "Hilelismo" konsistas en la kreado de morala ponto, per kiu povus unuiĝi frate ĉiuj popoloj kaj religioj, sen la kreado de iaj nove elpensitaj dogmoj kaj sen la bezono, ke la popoloj forĵetu siajn religiojn ĝisnunajn. Mia plano konsistas en la kreado de tia religia unuiĝo, kiu pace enprenus en sin kaj interpacigus en si ĉiujn diversajn apartajn familiojn, devigante neniun el ili rifuzi siajn apartajn familiajn tradiciojn.*"

Posttagmeze André Cherpillod raportis pri la religia penso de Zamenhof, kiu evoluis de la hilelismo celanta la judojn al la homaranismo celanta ĉiujn homojn.

Kaj tre precize kaj detale ĉion kaj multon pli oni povas legi en la 34-paĝa broŝuro, kiun li ĵus eldonis sub la titolo *Hillel la saĝulo, lia vivo, lia instruo*. Ĝi aĉeteblas ĉe CDELI. Prezo F 7.50. Pri tiu ĉi temo ankaŭ tre instrua estas lia broŝuro *Zamenhof kaj judismo*, eldonita en 1997. 61 paĝoj. F 10.90.

Sur tri tabloj ekspoziciigis kolekto da libroj kaj broŝuroj de André Cherpillod kaj la entuziasmo de la partoprenantoj manifestiĝis per la aĉeto de liaj verkoj por entuta sumo de F 414.30.



Talenta instruanto

La libro-servo de CDELI riĉiĝis je dekduo da novaj titoloj, por ke la partoprenantoj al la sabata seminario povu kompletigi sian kolekton de verkoj de tiu kompetenta kaj mult-

tema verkisto kaj agrablega preleganto.

Ĉiuj forlasis la seminarian kunvenon esprimante la esperon rehavi la okazon aŭskulti André Cherpillod, kaj certe ne estos la temoj, kiuj mankos, por la organizo de nova rendezuo kun li.

Konklude al la unua renkonto de la sabata seminario mi anoncis, ke la dua renkonto de la sabato 3-a decembro estos refoje dediĉita al la hilelismo kaj homaranismo de Zamenhof, por ke la interesatoj havu la okazon kune legi la plej signifajn tekstojn kaj malfermi diskutojn pri la diroj de Zamenhof. La studon mi havos la honoron gvidi post enkonduko al la temo fare de nia historiisto Andreas Künzli.

Ne estas dubo, ke tiu dua seminaria sabato ankaŭ vekos la intereson de la partoprenantoj.

Claude Gacond

-oOo-

Leginde!

LA POSTDOMO de Istvan Ertl.

Recenzo de Mireille Grosjean

Mi daŭre ridegis, mi ŝategis tiun originalan, nekutiman verketon, pro ĝiaj elstaraj kvalitoj. Oni ne ricevas ĉiun tagon tian verkon malkovrotan.

Istvan Ertl rakontas murdaferon en « Boterhamo » (legu Roterdamo) ĉe la Centra Oficejo de Internacia Esperanto-Asocio IEA pere de tre,

eŭfemisme dirite, kreema stilo. La leganto devas koni ege multajn vortojn por ĝui ĉiujn kunmetaĵojn kaj kompreni ĉiujn eltrovitaĵojn. Retmesaĝo fariĝas « ratmasaĝo », kafo-paŭzo kolizias kun pafokaŭzo. Aludoj kaj citaĵoj abundas, certe mi nek malkovris nek erigis ĉiujn. Lasu min citi plu (mi skribas nur nomojn): Erwin Tastl, redaktoro de la revuo, Raneto Krozeti, Miela Liphari, Ŝimo Fumojeviĉ, Olisadebe Devoti, Tutmonde Universala Junularo Esperantista TUJO, Atlaso Oreltira Reprovas, Trefort Stilo, Stagno Marĉa, numero 287 de *Verondo Ekskomunikas*, Toy Bigboy, UK en Forta Lezo, Humpty Dunkin, Peklo Kofri, Kip Kangoorby, Drivo Oscedov, ktp. Mi ŝategis la verkon plie pro la fakto, ke mi sufiĉe bone konas la estraranojn de UEA dum la lastaj jaroj kaj kelkajn kunlaborantojn de la Centra Oficejo, konsekvence de mia komitatanejo.

Sur la dorsoflanko de la libro legiĝas:

« En stilo samtempe malsimpla kaj flua, Ertl satire eternigas la nanojn de Esperantujo kiujn alie glutus letea forgeso... Giorgio Kacmaĉo, *Fronto*.

La verko, se nomi ĝin tiel, estas plena je persona malamo kaj tipe kacmaĉeska insultemo. Georg Silber *Literatura Verniso*.

La Postdomo kontribuas nek al la disvastigo, nek al la instruado, nek al la utiligado de Esperanto. Raneto Krozeti. *La Komencanto*. »

Sur paĝo 77 el 80 legiĝas la disfalo de la domo, kie situas la Centra

Oficejo en Boterhamo. Malkovru kaj ĝuu !

« ...la mura fendego en ĉambro Klaùstraliao (tiu kovrita per kalendaro de Mona Turismo) fariĝis centimetron pli larĝa kaj ekimpetis supren. Subtegmente, ĉambro Ŝvebio solidare transprenis la iniciaton per propra mur-krako. Dormejo Berval' kaj deponejo Barbario zorgis pri horizontala daŭrigo. Etaĝon sub Klaùstraliao, ĉambroj Manila, Las Vegas kaj Klement Klafit ne povis resti indiferentaj, kaj produktis fendegojn fute larĝajn. Ĉambroj Kalado kaj Olisadebe Devoti, la kaflokalo Marwin Brug kaj Salono Zamenhof fermis la vicon per efektiva ekkolapso.

Etaj rompoj kaj eternaj kaputiĝoj, bagatelaj truoj, ŝimoj, fendoj kaj faŭltoj, akumulitaj dum jardekoj kaj malzorgo kaj centjaro da stulteco, adiciiĝis al forto tertremsimila, kiu ŝancelis, ekskuis, ekpecigis, dismovis kaj disblovis, kaj fine eksplodece ekzekutis la imponan konstruaĵon, kiu estis ĝis ĵus la sidejo de Internacia Esperanto-Asocio.

La muroj de Oude Buitenweg 166 ekkrakis kaj falis por ĉiam. »

Tiu verketo estas la plej bona pruvo de la riĉeco kaj esprimpovo de la lingvo Esperanto en la manoj, sub la plumo, tra la vortoj, per la spritaj spiritosplitoj de elstara hungardevena batava artisto verkisto Ertl.

Mireille Grosjean

-oOo-

Malkovru Esperanton sur la Reto

Jean-Marc Leresche

Por helpi la gelegantojn de SES-informas, mi proponas ĉi-sube elekton de interesaj paĝaroj pri la zamenhofa lingvo. Kompreneble tiuj ligiloj estas persone elektitaj. Ekzistas multege aliaj.

Bona enkonduka adreso estas tiu : <http://www.esperanto.net/>. Ĝi proponas diverslingve la bazojn de la lingvo kaj multajn aliajn informojn pri la movado. Alia bona prezento pri la movado en Francujo estas <http://www.esperanto-france.org/>. Klaku « en esperanto » por trovi la informojn en esperanto.

Post la enkonduko venas la lernado kaj la praktiko : kiel jam prezentite en la unua numero de « SES-informas » de la jaro 2005, Lernu !, www.lernu.net estas la plej bona lernilo. Se vi legas aŭ legis la romaneton de Claude Piron « **Gerda malaperis** », vi certe konsideros tiun paĝaron utilega : <http://www.ikurso.esperanto-jeunes.org/fr/lasu/>. Ĝi kolektas tekstaron sekvantan la ĉapitron de la libro. La gestudentoj tiel progresas ankoraŭ pli rapide !

Eble vi pensas aĉeti vortaron. Kial pagi multe por trovi preskaŭ la samon interrete sen elspezi iun moneron ? <http://purl.org/NET/voko/revo/> proponas tre bonajn klarigojn. La serĉilo funkcias laŭ la lingvoj aŭ fakoj. Ĉu la longaj klarigoj enuigas vin ? Vi opinias, ke bildo diras pli ol teksto : la sekvanta adreso estas por vi : <http://www.krokodilo.de/vortaro/vortaro.html>. Vi malkovros ne nur

amuzajn bildojn sed diverslingvajn tradukojn.

La Esperanto-gramatiko estas simpla kaj facila, tute veras ! Por plibonigi viajn konojn pri la uzado de iu ajn prepozicio aŭ pri la skribmaniero de la nombroj (ekzemple), la paĝaro PMEG estas je via dispono :

<http://www.bertilow.com/pmeg/index.html>
. Tre plena gramatiko, kie vi malkovros kaŝitajn dirmanierojn.

Mi jam aŭdas kelkajn gelegantojn dirantajn : « Interesaj informoj, sed Esperanto estas praktika komunikilo. Ni volas trovi gesamideanojn ». Mi ne surdas, mi havas solvon : <http://www.edukado.net/>, kiu proponas kursarojn kaj tre efikan korespondan servon tute senpagan. Vi povas respondi al anoncoj aŭ vi mem inseras iun por trovi gekorespondantojn. Tio funkcias, kreu min !

Vi serĉas informilon : <http://gxangalo.com/> prezentas al vi la mondon en esperanto. Alia diverscela ligilo estas <http://www.esperanto.nu/> proponanta multajn servojn : bildokartoj elektronikaj, E-librejo (esperanto-libraro neprintebla, nur surekrane legebla) kaj anonco-servo.

Ĉu deziras pliajn informojn pri tiu adresaro ? – Mi tenas je via dispono paĝon kun la priskriboj de ĉiu ligilo. Mendu min kopion, kun plezure mi sendos ĝin al vi.

Jean-Marc Leresche – Rue du Temple 7 – CH-2400 Le Locle – Svislando
Telefono : +41(0)32 931 46 05 – retpoŝtadreso : leresche.j.m@bluewin.ch

Kanguruoj ĉe la Ursoj

Raporto pri la klasinterŝanĝo flanke de la «Ursoj» (Ecole de La Grande Ourse)

Niaj ĉefaj celoj per la ĉi-septembra gastigo de aŭstraliaj infanoj (lernantaj Esperanton same kiel ĉe ni, en lernejoj kadroj) estis:

- plibonigi la nivelon de niaj gelernantoj en natura situacio
- montri kaj praktikigi al niaj gelernantoj la utilon, la vivantecon de Esperanto inter diverslingvanoj
- montri kaj praktikigi, ke malgraŭ kelkaj prononcdiferencoj oni tamen povas komuniki per Esperanto
- profiti de la vizito laŭ interkultura vidpunkto.

Por prepari la alvenon de la vizitoj, niaj lernantoj sekvis malgrandan projekton pri Aŭstralio-Svislando, kadre de kiu ili studis la du landojn el diversaj aspektoj, kiel geografio, historio, populacio, kutimoj, ktp. Eĉ en la matematiko ili utiligis tiun ĉi proksimiĝantan viziton kalkulante distancojn, rapidecon de la aviadilo laŭ la aviadila horplano, konsiderante la tempon de ŝanĝoj, paŭzoj, ktp.

Dum la unua semajno marde ni faris tuttagan ekskurson, vizitante diversajn lokojn en la kantono Neuchâtel kun la celo prezenti Svislandon el vivproksimo, same ties pejzaĝojn (lagoj, montoj kaj belvidejoj ja ne mankas en la kantono), kiel ties historion tra prezentoj de la politika vivo en la kantono (kun ties klarigo nacinivele), de la fortikaĵoj (ja ili tute ne ekzistas en Aŭstralio), de la aŭtomobil- kaj muzikskatol-muzeoj (por gustumigi iom ankaŭ la lokajn tradiciojn). Krom tiu tuttaga ekskurso ĉiun antaŭtagmezon ni havis Esperanto-kursojn je du niveloj, unufoje kunkantadon kun Olivier Tzaut, kaj posttagmeze diversajn aktivecojn, kiel la reciproka prezento de niaj landoj, ekskurseto sur «Vue-des-Alpes» - «Tête de Ran» kaj vizito de la urbo La Chaux-de-Fonds kun la bestoĝardeneto kaj la horloĝmuzeo.

Dum la dua semajno ni iris kampadumi al Montoz (Berna Ĵuraso), kie antaŭtagmeze estis Esperanto-kursoj je tri niveloj, krome angla kaj franca kursetoj por konatiĝi kun la lingvo de la aliaj. La posttagmezo donis lokon al sportludoj, teatrumado, bivakfajra panbakado kaj liberaj ludoj.

Por la loĝigo de niaj gastoj dum la unua semajno kaj la semajnfinoj ni trovis gastigajn familiojn preskaŭ por ĉiuj inter la familioj de nia lernejo.

La celoj de la interŝanĝo bedaŭrinde ne estis cent procente atingitaj pro diversaj kialoj, inter kiuj la plej gravaj estis eble la tro grandaj lingvaj nivel-diferencoj inter la infanoj pri kiuj ni ne vere konsciis laŭ la malmultaj kaj tre mallongaj leterinterŝanĝoj inter la du grupoj, kaj estas ne malkonsiderenda ankaŭ la ĝenerala aĝo-diferenco inter la Kanguruoj kaj la Ursoj. (Tiujn ĉi kromnomojn ni trovis kune kun la infanoj ankoraŭ tute en la komenco por ne diri «aŭstralianoj» kaj «svisoj», kiuj sonis iom strange kaj «malvarmete», kiam oni devas plurfoje tage voki, nomi ilin.) Ankaŭ inter la sociaj, grupaj kaj kunlaboraj manieroj montriĝis pluraj, sufiĉe grandaj diferencoj, kiu same ne helpis kontentige atingi la antaŭviditajn celojn.

Tamen inter la atingitaj celoj estis la konsciiĝo pri multaj diversecoj inter alilingvanoj, kiuj apenaŭ havas komunan komunikilon (pro la tro grandaj nivel-diferencoj), interkulturaj diferencoj kiuj montriĝis dum la ĉiutaga kunvivado, la diferencoj inter la labormanieroj kaj la investita tempo por la lingvo-alproprigo. Ekzemple la Kanguruoj havas 45 minutan lecionon semajne, dum kiu ili parolas ofte en la angla por la klarigoj, kio povas kaŭzi la fenomenon, ke kelkaj infanoj eĉ fine de la dua semajno ne sukcesis vere akcepti la fakton, ke ne la tuta mondo parolas la anglan, kaj tiu konvinko malhelpis ilin en la lingvolernado, ja tiukaze la vera motivo mankas al ili. La Ursoj komence havas minimume 2 horojn da Esperanto semajne, poste (progresante) 1 horon, dum kiuj lecionoj ili aŭdas preskaŭ nur esperantan paroladon, do almenaŭ komprennivele eĉ la tutkomencantoj (kiuj havis Esperanton nur 2 semajnojn antaŭ la alveno de la gastoj) ne havis tro grandajn problemojn. Tamen el tiu situacio ili almenaŭ povis gajni la sperton, ke por povi bone kunlabori, komuniki, oni bezonas komunan lingvon, kaj por tiu celo eĉ la tre malmulta komuna esperanta scio helpis pli ol la franca aŭ la angla lingvoj. Kelkaj Ursoj tamen esprimis sian bedaŭron pri tio, ke la Kanguruoj ne tre bone parolis Esperanton, kaj pro tio ili povis havi malpli da personaj kontaktoj kun ili ol kiom ili esperis. Tamen, ĝojige ni povis vidi ankaŭ unu bonan interŝanĝon inter unu lerta Kanguruino kaj la progresanta Ursino, kiu gastigis ŝin. La

du knabinoj fariĝis bonaj amikinoj! (Fakte ĉe ili realiĝis pli-malpli tio, kion ni ŝatintus atingi ĝenerale per tiu ĉi interŝanĝo.)

Kiel plu? Malgraŭ la multaj malfacilaĵoj kreiĝis amikecoj inter la infanoj, kaj dum la komuna konkludo multaj rememoris kaj rememorigis al la aliaj la agrablajn momentojn, kiujn ili vivis dum la du semajnoj. Espereble la rilatado inter ili ne interrompiĝos, ja ili promesis unu al la alia teni la kontakton pere de retleteroj. Intertempe alvenis jam tri «kanguru-leteroj». La Kanguruoj esprimis sian deziron havi la eblon gastigi baldaŭ la Ursojn ĉe ili, kio estas tre ĝentila propono, sed kiu ŝajnas esti nur bela revo por ni, ĉar inter la pluraj malfacilaĵoj jam nur la financa flanko de tiu vojaĝo starigas tro altan barilon antaŭ nin. Sed ĉiukaze estis simpatia gesto.

La konkludo eble povus esti tio, ke la projekto de la interŝanĝo estis tre alloga, kaj la aŭstralia instruistino, Saani Bennetts tre kuraĝa por realigi tiun ĉi projekton (eĉ tiel, ke ŝi mem je la lanĉo de la projekto lernis Esperanton nur de 10 monatoj!), la longan vojaĝon kun tiuj tre junaj infanoj, kaj la tutan organizadon. Sed eble estintus preferinde havi pli longan kaj pli intensan kunlaboradon antaŭ tiu granda aventuro. Kompreneble eĉ tiel estintus multaj faktoroj, kiuj povintus malhelpi nin, kiel ekzemple la diverstempaj lernejoj ferioj (temante pri tiom fora lando), la diverstempa lernojarkomenco (ĉiam estus tutkomencantoj aŭ de unu aŭ de la alia flanko), kaj sekve de tiu ĉi lasta argumento, se la antaŭpreparoj estas tro longaj, la lernantoj partoprenantaj la projekton je la vojaĝ-realigo eble ne plu estus la samaj ol tiuj, kiuj komencis la korespondadon. Do, verŝajne tute ideala situacio ne ekzistas, sed post tiuj ĉi realaj spertoj ni multe pli bone vidas, ke je simila futura projekto pri kiuj detaloj oni devos multe pli atenti flanke de la organizantoj.


Kaj eĉ se nia eksperimento ne sukcesis laŭ niaj revoj, tamen ĝi estis tre bona kaj pripensinda eksperimento, kiu multon donis al nia lernejo. Ni multe dankas SES kaj la donacintojn pro iliaj subtenoj, kiuj permesis al ni havi tiun spert-riĉiĝon!

Tiuj ĉi estas la rimarkoj flanke de la Ursoj, kaj ni estas atendantaj la raporton el la vidpunkto de la Kanguruoj.


Nome de la Ursoj: Mónica Molnár

Bildoj el nia fotoalbumo - momentoj el nia komuna vivo...


11.09 - 17.09.2005.



Kunkantado
kun Olivier Tzaut



Esperanto-kursoj
en la lernejo...




... kaj dum la
kampadumo




La Kanguruoj ankoraŭ ne
kredas, ke tiu pastaĵo vere
fariĝos pano...



Por la ĉiutaga sporto ni
havis tre belan veteron!



Posttagmeza manĝeto
ekstere



Dum la adiaŭa festeto
estis prezentitaj en
Esperanto unu malgranda
skeĉo kaj du kantoj,
ĉiuj preparitaj dum la
kampadumo

Ne estis facile
komence ekparoli unu
kun la aliaj, sed la
disiĝo eble estis
ankoraŭ pli
malfacila...



Sociologoj pri la escepta kazo Svislando

Ĉu post jardekoj de sinapogo sur la escepta kazo Svislando – rekta demokratio, kantonaj partikularismoj, milita sendamaĝo, banka sekreto, unueco malgraŭ kultura, lingva kaj konfesia diverseco – iĝas el ĉi tiu narcisisma memkontento reala identeca krizo ?

• Richard Schneller¹

Ĉu vi jam rimarkis la ruĝajn toĉemizojn, la kaskedojn kun blanka kruco portataj de parto de la hodiaŭa junularo ? Certe ne nur tiu moda fenomeno instigis la svisan kongreson de sociologoj pritrakti post la lastjara temo pri novliberalismo ĉi-jare tiun de la escepta kazo Svislando.

Enketo pri la svisaj junuloj

Invitita gasto dum la 50a jubilea kongreso de la Svisa Asocio por Sociologio okazinta en St.Gallen estis ankaŭ la prezidanto de la Germana Sociologia Asocio, Karl Siegbert-Rehberg, kiu skizis bildon de la « insula helvetica » kiel socio de ekvilibro. Li konstatis ke la svisa modelo sukcesis kaj estas defendebla. Li aludis pri la svisa mito de la « Réduit » (rezistejo) : « Svisio antaŭ ĉio deziras esti ne ĝenata kaj ĝia politiko precipe

postulas ion : paciencon. » Siegbert-Rehberg ankaŭ analizis la enketon ĉe rekrutoj kaj konkludas ke la junaj svisoj « scias ligi malfermitecon al la mondo kaj valorigon de la propra hejmlando – la konscio vivi en privilegiita pozicio – kaj ke tio ne nepre kondukas al memfermitecon ».

Potencialo por la estonto

Kutime oni komprenas la esceptan kazon Svislando en politika diskutado kiel « fakmurigon » kontraŭ la ĉirkaŭo sentita kiel minaco. En la naŭdekaj jaroj ĝi estis tre kritikata de la intelektuloj, hodiaŭ ĝi regajnas popularacon. Laŭ la sociologo Kurt Imhof de la zurika universitato la escepta kazo ne devige signifas stagnadon kiel li ironie konstatas : « Io nova aperas en Svisio sisteme en la vestaĵo de io malnova. Kiu volas ŝanĝi ion, devas ĝin ligi al la mito de la minacata demokratio kamparana. » Li trovas ke tion oni ne devus lasi sole al la Svisa Popolpartio kaj ke la aliaj partioj devus konsciiĝi pri tio. La escepta kazo Svislando havas ankaŭ potencialon por la estonto. Konsentite, ĝi vivis depost 1945 altgrade kun la imagoj de la malamiko, kiuj forvaporigis post la falo de la muro. Minaco ekstera kaj ksenofobio perdas je graveco kaj post la Expo.02 disvastiĝas « leĝerpieda » patriotismo

¹ Laŭ artikoloj aperintaj en « St.Galler Tagblatt », 5.-8.10.2005.

svisa, kiu kunigas malfermitecon al la mondo kaj fieron pri la propra lando. Imhof opinias ke oni povus utiligi iun

nove interpretitan « esceptan kazon » por la nuntempo.

Verkistoj pri Svislando

Martin Luther deklaris en 1529 en Marburgo ke la svisoj havas « alian » spiriton.

Gottfried Keller, 1848-ulo, opiniis ke « la liberalan ŝtaton kaj aŭtentikan demokration oni suben-muzikigis al foira trompado kaj kapital-kabano ».

Max Frisch observis en sia « Dienstbüchlein » (Soldatserva libreto, 1974, rememoroj pri la soldatservo dum la dua mondmilito) ke lingvo povas reliefigi klasajn diferencojn : ordonojn oni donas en la germana normlingvo, la subulo respondas alemane. Pri la portado de la kasko aŭ gasmasko ankaŭ ekzistas rangdiferenco : la leŭtenanto devas porti ilin pli ofte ol la kapitano kaj por la pli malalte graditoj la portado estas ankoraŭ pli ofte deviga.

Peter Bichsel, nuntempa verkisto kaj en la sesdekaj jaroj konsilanto de la tiama federacia konsilisto Willy Ritschard, konstatis : « Por ni la vorto eksterlando havas ĉiam la kromsignifon de mizero. »

Unueco en diverseco ?

La zurika politologo Hanspeter Kriesi konstatas, ke Svisio estas hodiaŭ « modelo por multaj ». Sed li dubas ĉu ĝi taŭgas por la estonto. Svisio havas siajn simbolojn, propran monsystemon, armeon kaj nacian futbalteamon. Tamen ĝi ne progresis tiom en la formiĝo al ŝtato kaj nacio kiel aliaj landoj. Reale ĝi tamen restis federacio de ŝtatoj. Svisio ne havas veran centron, la kantonoj havas grandan potencon, speciale la rajton de impostkolektado. Se iu volas iĝi svisa civitano li devas esti akceptita unue de la komunumo. Por trovi solvojn en la politiko de la familio, prizorgado kaj edukado nenio eblas sen la konsento de la kantonoj. La juristo pri ŝtata juro Carl Hilty difinis Svision kiel « Volnacion ». Ke ĉi tiu konstruaĵo ebligas kunvivadon de tre diversaj

grupoj lingvaj kaj konfesiaj montriĝas promesplena por la estonto.

Kriesi opinias ke « la unueco en la diverseco estas modelo por multaj, sed ekzistas nenio garantio, ke ĉio kondukas al bona fino ». La komuneco de la politika kulturo estas nur magra. En Germanio ĝi estas speciale vundebla. Longtempe ĝi estis unueca pro la ekstera minaco, depost la murfalo la premo malaperis. La origine konfesiaj konfliktlinioj ne plu havas signifon, urbaj kaj aglomeraj zonoj ne estas antaŭviditaj en la federacia sistemo. La novaj spacaj diferencoj ne plu estas konformaj al la tradiciaj politikaj limoj. Tio gravas kaj paralizas la kapablon je reformoj. Cetere la stagnanta ekonomio baldaŭ igos Svislandon normalan kazon. El tio sekvas senorientiĝo kaj frustriĝo. Ekzistas politika tendenco kiu volas profiti per

naciaj sentoj el la erao de la escepta kazo.

Expo.02

Juliane Sauer, sciencisto pri komunikaj sciencoj en la universitato de Friburgo, enketis pri la opinioj de la organizantoj kaj vizitantoj de la nacia ekspozicio Expo.02, kiun vizitis kvindek procentoj de la svisa loĝantaro. Tia evento por kvazaŭa memcertiĝo pri la unueco de « fragmentita identeco » okazis malofte : nur en la jaroj 1883, 1939, 1964 kaj 2002. Sauer konkludas ke ĉiuj perceptis la heterogenecon de la lando kiel esencan faktoron de ĝia identeco.

Martin Heller, direktoro de Expo.02, dum podia diskuto dezirintus nacian kulturen politikon kaj kritikis la sintenon de tiuj svisoj kiuj ne komprenas ke ili rilate vivnivelon kaj riĉecon estas escepta kazo sed pro tio ili ne estas pli bonaj, kontraŭe tio malfortigas ilian produktivecon.

Heredaĵo de la ĝenevaj kalvinistoj

La banka sekreto ŝajne estas parto de la svisa identeco, eĉ se tre pridisputata. Stefan Tobler de la zurika universitato esploris ĉi tiun temon kaj ĝian percepton en la publiko. La banka sekreto aperis en la 16a/17a jarcento en la kalvinista urbo Ĝenevo. En 1934 ĝi estis leĝe fiksita. Tobler substrekas ke la banka sekreto estas « tute klare instrumento de la ekstera politiko laŭ la moto : kio estas bona por la bankoj ankaŭ estas bona por Svisio ». La intervenoj de la eksterlando klopode al forigo de la unikaj nocioj « imposta fraŭdo » (protektata de la banka sekreto) kaj la « imposta trompo » (punenda) ĝis nun ne efikis. Tobler konstatas ke en la publika diskutado svisaj voĉoj argumentas per naciaj interesoj, dum la eksterlando temigas la aspekton de la krimeco. Eble la banka sekreto estas ankaŭ unu el la kaŭzoj de la svisa malemo aliĝi al Eŭropa Unio.

La interlingvistikaj studoj altiras gestudentojn

• Iłona Koutny

Inter la 26a kaj 30a de septembro okazis la unua sesio por la novaj gestudentoj de la postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj de UAM (Universitato Adam Mickiewicz), en Poznań. 27 kandidatoj el 13 landoj aliĝis al la trijara ekstera studado, kiu postulas surlokan partoprenon nur dum unu intensa semajno ĉiusemestre, kaj tion sekvas hejma laboro kaj reta kon-

sultado. La multnacia partoprenantaro ebligis interesajn interkulturajn komparojn.

La unua semestro konsistis el la kursoj pri komunikado (Iłona Koutny), enkonduko en esperantan kulturon (Zbigniew Galor), esperanta literaturo de la unua periodo (Lidia Ligęza kaj Tomasz Chmielik) kaj interlingvistiko I (Vera Barandovská-Frank kaj Detlev Blanke). La kurson pri kulturo kompletigis la prelegoj pri

esperanta teatro (Zofia Banet-Fornalowa), pri esperanta muziko (Floréal Martorell) kaj pri esperantaj filmoj (Roman Dobrzynski) okazintaj jam enkadre de la semajnfina kultura renkontiĝo Arkones.

Dum la sama semajno tri finstudintoj faris sukcesan finekzamenon defendante sian diplomlaboraĵon pri metodiko gvidatan de Katalin Kovats : Alain Delmotte (Belgio) : Analizo de vortprovizo en kvar lernolibroj ; Iwona Kocięba (polino el Belgio) : Instruado de akuzativo ; Mónica Molnár (hungarino el Svislando) : Muziko en la instruado. Arkones atendis la diligentajn gestudentojn per multe da

elstara muziko (JoMo, Jacques Le Puil, Georgo Handzlik, Suzanna Kornicka, Paulo Mojajev, Natalia Stijnjova, Yas Kawamura, Moliere Ngangu, Robert von dem Borne, la bandoj Dolĉamar' kaj Krio de l' morto) kaj per aliaj kulturaj eventoj : de diverstemaj prelegoj tra oratora konkurso ĝis teceremonio.

D-rino Ilona Koutny, akademiano, gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj Universitato Adam Mickiewicz Miedzochodka 5, PL-60-371 Poznań, T. +48 61 829-27-09, Sekretariejo: 829-27-01, F. +48 61 829-27-00, <http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/index.html>

Broŝuroj pri Hiroŝimo kaj Nagasako en CDELI

Okaze de la memoro pri la 60a datreveno de la atombomba detruo de du japanaj urboj, eblas legi en esperanto inter aliaj la sube listigitajn erojn.

- *Richard Schneller*

CUĆIDA, Jasu. Hiroŝimo en la 6a de aŭgusto ; Hibakŝoj (postvivantoj) post la tago. Jokohama : Esperanto-Rondo, 1968 (?), 63 p.

Travivaĵoj de postvivantoj al la katastrofo.

En la nubon ŝi sorbiĝis for ! : la apelo el Nagasaki. (La originalo kompilita de la Grupo de atombombitaj instruistoj, la redakta komitato de materialoj de porpacpa edukado en

Nagasaki.) Kanda-mati : Kjuŝua Esperanto-Ligo, 1973, 62 p.

Rakonto aranĝita por infanoj pri la atombombo kaj la sekvoj.

Hiroŝima : el la filmo « Infanoj de l' atombombo ». Kompilis : Kansai-Ligo de esperanto-grupoj. Osaka : Japana Esperanta Librokooperativo, 1952, 10 p.

KELEN, Stephen. Mi memoras Hiroŝimon. Traduko de R. L. Harry. Matraville : Aŭstralia Esperanto-Asocio, 1995 (?), 78 p.

La aŭtoro, speciala ĵurnalisto ĉe la « Novaĵo de la Brita Okuparmeo », pasigis pli ol tri jarojn en kaj ĉirkaŭ Hiroŝimo verkante kaj kaptante fotojn pri la detruoj.

NAKAZAŬA, Keizi. Nudpieda Gen. Tradukis IZUMI Yukio. Tokio : Rondo Gen, 1982, 284 p.

Bildrakonto pri familio provanta rezisti al la ĉirkaŭa militisma etoso kaj spertanta la bombatakon.

OGURA, Toyofumi. Kun la kadavro de l' edzino. Tradukis TANAKA, Sadami. Osaka : Japana Esperanta Librokooperativo, 1954 (?), 52 p.

Profesoro de la Hiroŝima Universitato rakontas pri la tragedio tuj post la eksplodo kiun li postvivis sed ne la edzino.

OSADA, Arata. Infanoj de l'atombombo : alvokas geknaboj de Hiroŝimo. Resume trad. Kansai-Ligo de

esperantaj grupoj. Osaka : Japana Esperanta Librokooperativo, 1951, 71 p. (kaj 2a eldono 1958, 71 p.)

Travivaĵoj de geknaboj spertintaj la atombomban eksplodon.

Viktimoj de la atombombo : travivaĵoj de atomvunditoj en Hiroŝima. Tradukita de Jui-Ĉunoŝin ; redaktita de Hukuta-Masao ; antaŭparolo de Hamai-Ŝinzo. Tokio, 1968, 133 p.

29 atestoj de hiroŝimanoj, viktimoj de la atombombo.

(CDELI : adresojn vidu en la koncerna rubriko de ĉi tiu numero de « SES informas ».)

SAT-kongresoj en Balkanio

• *Gazetara servo de SAT-Amikaro*

Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), kiu havas membrojn en kvindeko da landoj, estas ekzemplo de organizo sen landlimoj per sia strukturo kaj aktivaĵoj. Per elekto de lingvo libera je ĉia ligiteco kun iu ajn potenco, ĝi enskribis en la faktoj la principon de justeco en la lingva komunikado multe pli frue ol tiu vorto eniris la kuran lingvon. Ĝia devizo estas : « SAT-anoj kutimiĝu al ekster-nacia sent-, pens- kaj agadkapablo. »

De oktobro 2004 ĝis oktobro 2005, SAT, kiu havas membrojn en kvindeko da landoj, registris aliĝojn el Ĉinio (2), Koreio (4), Japanio (3), Brazilo (1), Usono (1) kaj precipe el Eŭropo : Germanio (1), Bulgario (1), Kroatio (3), Hispanio (1), Francio (9),

Britio (1), Hungario (2), Litovio (3), Serbio-Montenegro (3), Svedio (2). La Interreto iom post iom kontribuas al ekvilibro laŭ kontinentoj. La spirita sendependeco de tiu socikultura asocio, kiu tuj adoptis Esperanton kiel laborlingvon ekde ĝia fondiĝo en Prago, en 1921, havigis al ĝi certan abomenon de la reĝimoj antaŭe fermitaj al la libereco de komunikado kaj penso.

Norda Koreio restas nun la sola lando fermita ne nur al SAT, sed ankaŭ al Esperanto.

Jam de 1970, SAT eldonis la plej kompletan el la vortaroj de la Internacia lingvo : la « Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto », kies lasta eldono aperis en 2005. Inter la verkoj, kiujn ĝi eldonis, tiuj kiuj plej multe instigas al pripensado estas « 7000

tagoj en Siberio », « Vualo de l' silento », « Vivbruligita ». SAT publikigas ĉiujare dek numerojn de sia revuo « Sennaciulo » kaj unu numeron de « Sennacieca Revuo ».

Ĝia pasinta kongreso okazis en Zagrebo (Kroatio) ; ĝia venonta havos lokon en Beogrado de la 19a ĝis la 26a de aŭgusto 2006. Ĝi estos jubilea, ĉar SAT-kongreso jam okazis tie en 1956, 50 jarojn antaŭe.

SAT nemalofte kongresis en tiu parto en Eŭropo :

1956 : Beogrado (Jugoslavio, Serbio)

1969 : Novi-Sad (Jugoslavio, Serbio)

1980 : Rijeka (Jugoslavio, Kroatio)

1993 : Kazanlak (Bulgario)

1995 : Maribor (Slovenio)

2005 : Zagrebo (Kroatio)

2006: Beogrado (Serbio-Montenegro).

Informoj pri ĉi lasta – okazonta – estas troveblaj ĉe :

<http://users.pandora.be/jakvo/SAT/SAT-Beogrado.html>

SAT kongresis dufoje ekster Eŭropo : en Toronto (Kanado, 1973) kaj Campos do Jordao (Brazilo, 1988). En 1991, SAT estis invitita teni sian kongreson en Sarajevo en 1993, bedaŭrinde la tragikaj cirkonstancoj malebligis ĝian okazigon. – Albert Einstein fariĝis honora prezidanto de ĝia tria kongreso (Kaselo, Germanio, 1923). La Poŝto de USSR eldonis plurajn poŝtmarkojn en rilato kun Esperanto, inter kiuj unu pri la SAT-kongreso okazinta en Moskvo en 1926. Profesoro Thorndike, angla lingvisto, taksis ke estis en Sovetio pli da parolantoj de Esperanto en 1929 ol da parolantoj de la germana. Sed jam manifestiĝis la katastrofa influo, ne nur por SAT kaj Esperanto, de Stalino en Sovetio kaj de Hitlero en Ger-

manio, tio estas en du landoj, kie Esperanto estis plej firme enradikiĝinta.

Ĝeneralaj informoj pri la soci-kultura aktivado de SAT kaj ĝia eldona agado troviĝas ĉe :

<http://satesperanto.free.fr/>

78a Kongreso de SAT en Zagrebo

• Tereza Sabatier

Mi partoprenis la SAT-kongreson en Zagrebo (Kroatio) komence de julio 2005. La frueco en la sezono bedaŭrinde malebligis partoprenon de iuj studentoj kaj instruistoj.

Estis intime kaj ege agrable kaj interese. La kongresejo situis en granda malnova parko de eksaj pioniroj kie estas dissemataj tranoktejoj en verdaĵoj kaj trankvileco.

Krom la fruktodonajn laborkunvenojn ni partoprenis turismajn aranĝojn. La tri ekskursoj bone disvolviĝis kaj plie profitis de belega vetero. Tondris nur kiam ni laboris !

Vespere en salono okazis koncerto, kantado, muziko, pluraj prelegoj pri sociaj temoj.

La aktivuloj Colette kaj André Weiss raportis pri sia vizito kun skipeto en senminigata kampo en Kroatio. Ili multe kaj sukcese aktivas de pluraj jaroj nome de SAT klopodante havigi monon de la franca ŝtato por senminigo en Kroatio.

Mi konservas agrablan senton de tiu kongreso kaj esperas ke la venonta en Beogrado arigos pli multe da homoj. La informoj kiujn donis al ni Terezija Kapista de la organiza komitato aperis tre allogaj.

La retoromanĉa nuntempe

La aŭtoro aplikas per originala komparo nocion el la merkatika scienco al la situacio de la retoromanĉa kaj samtempe priskribas klarvide ties hodiaŭajn problemojn kaj la staton de la planlingvo grizona romanĉa.

• *Vincent Augustin*²

Kiel konate la retoromanĉa³ estas nia kvara oficiala lingvo. Apenaŭ 70 000 parolantoj konsistigas ĉi tiun plej malgrandan etnolingvan minoritaton en Svisio. « Unique selling proposition » (la unika vendargumento) sonas en si mem promesplena. Kiu estas la rilato inter la moderna formulo el la angla mondlingvo kaj la retoromanĉa, kiu estas minoritata lingvo minacata de estingiĝo ?

Ekzistas multaj rilatoj – bedaŭrinde (preskaŭ) neniu rimarkas ilin. Minoritatoj plej ofte ĝuas minoritatan favoron. Tio estas bona, minoritatoj bezonas subtenon kaj solidaron, tio estas la filozofio de nia Kon-

² Vincent Augustin estas la nova prezidanto de la Lia Rumantscha. La artikolo aperis sub la titolo « La romanĉa – unika vendargumento » en « St.Galler Tagblatt », 16-4-2005, tradukis *Richard Schneller*.

³ Laŭ konsilo de Arthur Baur mi uzas la formon « retoromanĉa » kaj ne « reti-romanĉa » (vidu PIV), kiu lasta rilatas pli speciale al la regiono de la iama historia Retio (ampleksanta la italajn regionojn Friulo kaj Dolomitoj) kaj ne al la hodiaŭa Grizono (komparu A : rhaetoromanic, F : rhéto-roman, G : rätoromanisch).

federacio. Estiĝas la demando kiamaniere la retoromanĉa minoritato profitu de sia minoritata favoro. La merkatika scienco rapide donas al ni respondon – serĉi la merkatan niĉon kaj trovi ĝin, profiti de la unikeco kaj kompreni ĝin kiel ŝancon, do : « La retoromanĉa – unika vendargumento ! » Sen aroganteco la retoromanĉoj devus esti pli konsciaj de sia unikeco, kaj enigi tion per sana memfido en produktojn kaj servojn de la regiono, kiel okazas ie kaj tie kun sukceso. En la konkurenco kun pli potencaj partneroj la etuloj ne havas ŝancon !

Imagante ĉi tiun scenaron oni ne faru al si iluziojn. Tute ne estas tiel ke la retoromanĉoj vivas en siaj Alpoj valoj kiel en rezervejo. Tion ili ne alstrebas. Ĉiuj retoromanĉoj, virinoj kaj viroj, estas dulingvaj : retoromanĉa/germana. Tio ĉie manifestiĝas, en la lernejo, en la profesio kaj en la publika vivo. Ekzemple la retoromanĉa lernejo estas probable unu el la plej malnovaj dulingvaj lernejmodeloj entute. La avantaĝoj de la dulingveco estas evidentaj, kvankam kontraŭaj antaŭjuĝoj obstine persistas. Ankaŭ en tio validas : vidi la dulingvecon kiel ŝancon, ne kiel ĝenon.

Malfacilige aldoniĝas ke la retoromanĉa dividiĝas en kvin regionaj idiomoj, ĝis nun instruataj skriblingvoj en la lernejo. En ĉi tiu heterogena medio estas malfacile starigi tutretoromanĉan identecon. La mankon de propra skriblingvo oni sentis ek de

la momento kiam la retoromanĉa lingvo akiris signifon ekster la malvasta regiona areo.



Inter 1800 kaj 1960 fiaskis tri provoj de superregiona skriblingvo retoromanĉa. En la jaro 1982 la Lia Rumantscha (LR, tegmenta organizo de ĉiuj retoromanĉaj organizoj lingvaj kaj kulturaj) komisiis la zurikan romaniston Heinrich Schmid krei gvidliniojn por la ellaboro de la superregiona skriblingvo Rumantsch Grischun (rumanĉ griŝun = grizona romanĉa). Hodiaŭ – post apenaŭ kvaronjarcento – la ankoraŭ juna lingvo troviĝas antaŭ enkonduko kiel lerneja lingvo en unuaj elprovaj projektoj. La normigo de lingvoj de kelkaj jardekoj estas signifa branĉo de la lingvistiko – ankaŭ en eŭropa konekso – dum la lingvouzo en la ĉiutaga vivo konsistigas esencan parton de la sociolingvistiko. La LR dekomence sin apogis en sia lingvoplanado sur la science elprovitaj metodoj kaj pro-

cedoj de la moderna lingvoplanado kaj per tio provas kiel eble plej bone kontentigi la diversajn postulojn al ĝi direktitajn.

La lingva koncepto de la grizona romanĉa pruviĝis en la praktika apliko. La superregiona skriblingvo intertempe evoluigis fortan propran dinamikon kaj akiris signifon ankaŭ en kulturaj sferoj kiel literaturo, gazetaro, muziko kaj teatro. Iom pli malfacile formiĝas la klopodoj trovi larĝan akcepton en la diversaj retoromanĉaj valoj. Malgraŭ ĉiuj evidentaj avantaĝoj ekzistas kelkaj skeptikoj kaj timoj rilate la grizonan romanĉan.

« Tiu kiu konstruas pontojn, havas abismojn kontraŭ si. Ili sentas sin neglektataj », trafe karakterizas Hans Kaspar la problemaron koncerne la grizonan romanĉan. Ĝis la definitiva « unika vendargumento » la vojo estas ankoraŭ longa. Ĝojige estas ke ni iras en la bonan direkton.

